

## Leterujo

Claude Gacond, 140-a radioprelego, 1966.06.08 & 1966.06.11

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

El kvar kontinentoj alvenis salutoj de geaŭdantoj. Kelkaj skribis el sia hejmo, aliaj sendis poŝtkarton el sia feri-loko. Dank'al la porteblaj radio-riceviloj ili aŭskultas niajn prelegojn eĉ dum siaj ferioj. Jen nova sinteno ege simpatia.

A.- Ekzemple du svedaj aŭdantoj, sinjoroj Lennart Aberg el Skövde kaj Astor Emanuelsson el Boras, partoprenante studvojaĝon kun delegacio de Unuiĝinta Naciaro, aŭdis nin en Sousse (Tunizio) kaj gesinjoroj Gaston Turin el Pontarlier (Francio) aŭskultis nin en la kastelo Grésillon, kie ili feris dum Pasko.

Cl.- Do dum la someraj ferioj ne forgesu vian radio-ricevilon. Tiel vi ne perdos la kontakton kun Esperantujo, eĉ se vi tendumas en forgesita valetio aŭ veturas en senfinaj stratoj de urbegoj. Sinjorino Marcelle Turin en dua saluto raportas pri la morto de sinjorino Van Veenendaal-Bouwens, la fondintino de TEJO: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Se vi estis juna kaj jam esperantisto en la jaroj ĵus antaŭ la dua mondmilito, tiam vi certe renkontis tiun kuraĝan virinon, kiu senlace organizis kongresojn kaj aranĝis karavanajn vojaĝojn tra Eŭropojn. Esperantujo estas plena de tiuj sindonemaj pioniroj, kiuj dediĉas siajn fortojn kaj kapablojn por renkontigi homojn.

A.- Ankaŭ dum siaj ferioj sinjoro Kondor povis nin aŭdi. Li loĝas en Lampertheim (Okcidenta Germanio) kaj tre ŝatis nian komparon inter la socia situacio en la mondo kaj vilaĝo milloĝantara. Kiel edukisto li povis konstati la pedagogian valoron de la komparo.

Cl.- Tiun komparon ankaŭ ŝatis alia aŭdanto nomata Jonathan Pool kaj servanta nun en la usona pac-korpuso en Turkio. Ĉar ni ofte parolas pri la helpo al la malriĉaj landoj, ni tre ŝatus, ke tiu samideano skribu al ni pri siaj eksperimentoj. Se li tion faros, ni certe raportos dum elsendo.

A.- Ni revenu al Eŭropo. El Ĉeĥoslovakio salutis sinjoro Jiri Patera kaj el Britio sinjoro John Brownlee.

Cl.- Kaj nun el la kvara kontinento. El Usono skribis sinjoro Richard E. Wood de la urbo Bloomington (Ŝtato Indiana). Tiu amerika samideano regule kaptas niajn programojn. Okaze de la nordamerika esperanto kongreso kunsidonta en Springfield, ĉefurbo de la ŝtato Illinois, la 11 kaj 12-a de junio, li provos kapti kaj aŭdigi tiun ĉi elsendon.

A.- Ni profitas tiun okazon por saluti niajn amerikajn samideanojn. Ofte rigardante terglobon ni havas envion povi salti super la oceanojn por viziti esperantistojn en foraj landoj. Hodiaŭ se ni ne saltas korpe, spirite, aŭ voĉe, ni estas inter niaj amikoj en Springfield.

Cl.- Inter vi, estimataj kongresanoj, eble kelkaj faris longegan veturadon por renkonti esperantistojn. Kaj vi vivas en la entuziasmo povi paroli tiun lingvon, kiu reprezentas por vi tutmondan patrion.

A.- Vi tiam sentas la bezonon disvastigi tiun lingvon, kiu ne nur permesas al homoj diversnaciaj renkontiĝi, sed kiu helpas ilin kompreni, ke super la naciaj plafonoj ekzistas neŭtrale tuthomara ĉielo.

Cl.- En tiun ĉielon via nacio havas la fieron ĵeti satelitojn kaj astronautojn. Sed vi esperantistoj scias, ke se foje usonano renkontos soveton sur la luno, tiam ambaŭ riskos ne povi interparoli eĉ unu solan vorton.

## Leterujo

Claude Gacond, 140-a radioprelego, 1966.06.08 & 1966.06.11

A.- Ni esperantistoj ĝenerale ne estas tre fakaj en la alta tekniko. Tamen ni scias, ke ni plenumas grandegan funkcion. Ni trankvile eksperimentas lingvon. Tagon post tago tiu lingvo riĉiĝas je novaj libroj, novaj gazetoj, novaj adeptoj. Kaj unu fojon, kiam la homoj estos povintaj uzadi terure komplikajn tradukmaŝinojn por siaj interlingvaj rilatoj, tiam ili rimarkos, ke sen maŝinoj simplaj homoj delonge venkis la lingvajn barojn.

Cl.- Tiam nia lingvo sin trudos ĝis sur la lunon, kaj usonanoj povos tie babili kun sovetoj. Kaj ili malkovros, ke sur la luno ne plu estas rusoj aŭ amerikanoj, ĉinoj aŭ francoj, sed homoj kun homoj. Jen kion instruos nia lingvo.

A.- Sed atendante tiun belan epokon ni devas instrui nian lingvon. Pri tio vi certe parolos dum via kongreso. La instruado estas la hodiaŭa problemo de Esperantujo. Kiel la subevoluintaj landoj ni ne posedas sufiĉe da lernejoj, kie nia lingvo kaj kulturo estas sisteme kaj vastskale instruataj.

Cl.- La statistikoj pruvas, ke apenaŭ 2 procentoj de la esperantistaro lernis esperanton en lernejo. Ĉiuj ceteraj mem venis al la lingvo. Kaj inter tiuj duprocentanoj, kiom da personoj povas fieri esti akirinta en lernejo veran esperantan kulturon? Mi timas, ke ilia nombro tre etas.

A.- Pro tio ni havas verkistojn, kaj ilin ne konas. Aperas libroj, kaj ni ne kapablas bone aprezi ilian valoron. Ni fieras pri nia literaturo, poezio, originaleco, sed ni ilin apenaŭ konas. Jen la hodiaŭa situacio en Esperantujo.

Cl.- Kiel popolo, kiu malkovras sian ekziston, ni devas streĉi niajn fortojn por starigi pli ol nurajn interhomajn ligojn. Ni devas konstrui niajn universitatojn, elekti niajn ambasadorojn kaj trudi nian komunan volon. Ni ne plu devas akcepti vidi niajn infanojn devi lerni esperanton, kiel ni mem devis fari, ili rajtas ricevi en la popolaj lernejoj, kolegioj kaj universitatoj ne nur instruadon en la naciaj kaj antikvaj lingvoj, sed ankaŭ lecionojn pri kaj en esperanto.

A.- Ĝis nun ni tro facile timis la ceterulojn. Kiom ofte ni provas unue paroli plej diversajn fremdajn lingvojn kun eksterlandano, antaŭ ol kuraĝe ekuzi esperanton. Ni kuracu tiun kompleksan pri malsupereco, kaj tiam rapidege ni ricevos lokon en la lernejoj, kiel ni ekricevas lokon en la radio-elsendejoj.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-